8-6-1974

CGC Nº
00406 504/0001-06

# Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA
Ed. Jockey Club, sala 103
Telefone (061) 226-1298
70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA
Alameda dos Maruas, 471
Telefone (011) 275-1681
04.068 - São Paulo - SP

MAI/JUN/1983 BOLETIM INFORMATIVO Nº 77

## URBO OLINDA, NIA NOVA CELO

Akceptinte invitproponon de Pernambuka Esperanto-Asocio, de Recife, BKE realigos en la urbo Olinda, en la lasta semajno de novembro venonta, sian IV-an ĉiujaran kongreson.

Ekde 1980 decidis la estraro okazigi sian tradician eventon ĉiam en malsamaj ŝtatoj. Sekve, dum la estontaj dudek jaroj, Minas Gerais, São Paulo kaj la Federacia Distrikto (en kies urboj Juiz de Fora, São Paulo kaj Brazilja okazis la tri unuaj kongresoj - 1980/1982), ne plu havas ŝancon gastigi denove la grandan asembleon de la Konsilantaro.

Ni esperas, ke la kongreso en Olinda fariĝu unu el la plej vizitataj, gravaj kaj fruktodonaj festoj de la nacia Esperanto-Movado. Tian optimisman perspektinon estigas ne nur la kapablo, sperto kaj sindonemo de ĉiuj membroj de la Loka Organiza Komitato (inter kiuj troviĝas Prof-ro J. M. Mabesoone, D-ro Geraldo Pires Sitônio, Amaro Pinangé Soares kaj Severino Nunes Costa), sed ankaŭ antaŭvidata kunhelpo de la tiea registaro, same kiel la rekonata solidareco de la klera esperantistaro el la norda kaj nordorienta regionoj de nia lando.

Estas oportune sciigi ĉiujn brazilajn E-asociojn, ke la Konsilantaro ŝatus ricevi en Olinda plurajn invitproponojn cele al efektivigo de la sekvonta kongreso. Tiam, post ilia ekzameno, ni elektos la plej konvenan, kaj en Olinda mem ni anoncos la nomon de la urbo kie ni kongresos en 1984.

Casc



**"Fama pro siaj historio kaj arkitekturarto, Olinda estas nuntempe mondkonata kiel heredaĵo de la homaro. La bildo montras la Preĝejon Nia Sinjorino de la Monto (1535), konstruita kiam Brazilo estis apenaŭ 35-jara" (Foto Edicard).**



**"Monaĥejo S. Bento (1582), kie instaliĝis la unua jurscienca fakultato de Brazilo, laŭ imperiestra dekreto de 11-08-1827" (Foto Edicard).**

## BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Honora Prezidanto
Francisco de Souza Almada, Rua Galeão Carvalhal, 31, Ap. 73, BR 11100 - Santos - SP

**Estraro**

**Prezidanto:** Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo - SP

**Vicprezidanto:** Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

**Kasisto:** José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília - DF

**Sekretario:** F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

**Kulturaj Aferoj:** Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo - SP

**Informa Bulteno**
Oficiala organo planita por monata apero.
Dissendo senpaga

**RESPONDECAJ DIREKTOROJ:** Carlos A. S. Cunha, Nelson P. de Souza kaj Walter Francini
Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

## ESPERANTO EN NOVA FRIBURGO

Sub la organizado de la juna Patrick, kiu ricevas la helpon de sia patro, s-ro Gerhardt Petiot, efektiviĝis en Nova Friburgo (RJ) serio da prelegoj pri la internacia lingvo. La 27-an de Majo, je la 6-a vespere, ĉe Salono Eldorado de la Urbodomo, prof. Walter Francini traktis la temon "Homaj rajtoj kaj Esperanto"; la 28-an je la 10-a matene, ĉe salono de Spiritisma Friburga Asocio la sama oratoro prelegis pri "Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto"; je la 3-a posttagmeze, ĉe Filozofia Fakultato Sankta Dorotea, s-ro José Pedro Milagres, el São Gonçalo (RJ), paroladis pri "Pasporta Servo"; je la 8-a vespere, prof. Francini prelegis denove pri "Evangelio, Spiritismo kaj Esperanto" ĉe Spiritisma Societo Bezerra de Menezes. Partoprenis en la debatoj ankaŭ la poeto Jorge das Neves.

Patrick Petiot estas dekkvinjara junulo, kiu jam parolas plurajn lingvojn kaj nun finas la superan kurson ĉe Brazila Esperanto-Ligo. Lastjare li partoprenis la Universalan Kongreson en Antverpeno (Belgujo) kaj li jam flue parolas la internacian lingvon. En lia dormoĉambro vidiĝas detalo vere kortuŝa: sur meblo, apogite per subtenilo, staras libro, "Fundamento de Esperanto", malfermita ĉe la "Deklracio pri Esperantismo". Alia grava informo: Patrick instruas Esperanton jam antaŭ tri jaroj! Movado kiu kalkulas je la entuziasma aktivado de tia junulo (kaj de aliaj mirindaj homoj) havas sendube grandiozan estontecon.

WF

## MALUNUECA MOVADO, ĈU?

La revuo Esperanto (Paĝo 95-a de la n-ro majo/83) publikigis foton kaptitan en Brazilja, dum la 3-a kongreso de la Konsilantaro - decembro 1982 -, kie aperas Carlos Cunha, d-ro Braz Cosenza kaj kolonelo Ferdando J. G. Marinho, respektive prezidantoj de BKE, KKE, kaj BEL. Sub la foto venas la informo: **"Kvankam malunueca, la Movado en Brazilo notas bonajn sukcesojn".**

Ĉar la foto taŭgis por ilustri raporton de UEA-estraro pri ĝia agado dum la jaro 1982-a, oni devas kompreni, ke tiam, la Prezidanto Maertens ankoraŭ ne sciis, ke harmonia kunlaboremo regas nuntempe la agojn kaj projektojn de la tri landaj organizaĵoj, kies prezidantoj konsistigas la Nacian Esperanto-Komisionon (NEK), kupolan organon de la Movado por ĉiaj interesoj ligitaj al Internacia Lingvo en nia lando.

**Casc**



# TRA LA MONDO

**TERTREMO EN ROTERDAMO**

★ La definitiva foriro de d-ro Victor Sadler el la aktiva gvida rolo en la vivo de UEA okazigis veran tertremon en la Centra Oficejo en Roterdamo. Lia ofica kolego, s-ro S. Milojevic, Konsideras lin "unu el la plej elstaraj kaj plej multtalentaj homoj, kiuj ĝis nun servis la ideon de la Internacia Lingvo". Dum Nderlando perdis, gajnis Brazilo, ĉar d-ro Sadler transloĝiĝis al nia lando por integriĝi al la mondfama komunumo Bona Espero, en Alto Paraíso (GO). Estu bonvena, karega amiko Victor!

**EL LA POPOLA ĈINIO**

★ Laŭ la n-ro 2 de Espero Katolika 1983, en Ĉinio estas ĉirkaŭ tri milionoj da katolikoj, el kiuj 20 mil en Pekino. El la 4 preĝejoj iam funkciantaj en la ĉina ĉefurbo, 2 estas denove malfermitaj. En la pekina diocezo oficas dekduo da pastroj, aĝaj inter 50 kaj 70 jaroj. En 1981, ili baptis 300 homojn, celebris centon da geedziĝoj, konfirmaciis pli ol 300 fidelulojn. Ili baptas nur plenkreskulojn, kaj postulas seriozan preparon. Dek junuloj sin preparas al la pastreco. La Sankta Meso estas celebrata latine, kun la ĉeesto de ĉirkaŭ 2.000 homoj en la festotagoj.

★ "Sekve de la sciigo de la Eduka Ministerio de Ĉinio pri enkonduko de Esperanto en ĉinajn altlernejojn, ĉiam multiĝas interesiĝantoj. Laŭinforme, num troviĝas cent mil E-lernantoj, kaj ĉiutage venas al Ĉina Esperanto-Ligo kelcent aboniloj por la revuo "La Mondo" (parte ĉinlingva), kiun ĈEL lanĉis en 1981, antaŭvidante la bezonon de miloj da komencantoj. Eble tiu ĉi revuo kun ĉ. dudek mil legantoj estas rekorda inter la Esperanto-periodaĵoj de la mondo". (Rev. Esperanto, aprilo 83).

**INFORMADO DE UNUIĜINIA NACIARO**

★ "La per-papera informado pri la laboro de UN okazas, krom en la oficiala lingvoj de UN (angla, araba, ĉina, franca, hispana kaj rusa), ankaŭ en aliaj lingvoj, kiel la germana" (UN kaj Ni, n-ro 29). Kiam por tia celo rolos Esperanto? Kia bedaurindaĵo, ĉu ne?

**BRAZILA SCIENCA REVUO POR LA MONDO**

★ La unua numero de SIMPOZIO - filozofia revuo, aperis en marto nunjara. Tre grava eldonaĵo por la E-movado, ĝi povas aperi dank' al la idealismo kaj malavareco de la ĉefredaktoro, Prof-ro Evaldo Pauli (Rua Conselheiro Mafra 176, BR 88000 - Florianópolis - Brazilo). Kunredaktas la revuon D-ro Albert Goodheir, el Skotlando kaj S-ro Eugène de Zilah, el Francujo. Jarabono kostas 2 dolarojn usonajn por enlandanoj aŭ 2,50 por eksterlandanoj. Peranto en Brazilo, S-ro Gersi Alfredo Bays, Caixa Postal 49, BR 89800 - Chapecó-SC. Por la tuta mondo, la samaj perantoj de la beletra revuo Fonto.



## ĴUS APERIS!

Ellaborita de s-roj A. Flores kaj V. P. Werneck kaj eldonita de "Fonto" ĵus aperis en la portugala lingvo "Regras Gramaticais do Esperanto - A Língua Internacional Neutra". Temas pri verko 32-paĝa, presita sur bona papero, per la altnivela grafika tekniko de la "Fonto" - eldonaĵoj, kiu, krom prezenti la gramatikajn regulojn de Esperanto, enhavas ankaŭ tekstojn en la internacia lingvo, liston de rekomenditaj libroj, periodaĵoj kaj vortaroj, kaj adresoj de Esperanto -eldonejoj kaj asocioj. Ĝi estas sendube verko nemalhavebla por Esperanto-asocioj kaj ĉiuj disvastigantoj de la internacia lingvo en Brazilo kaj Portugalujo, ĉar ĝia enhavo, facile kaj rapide legebla, donas tujan bildon kaj pri Esperanto kaj pri ĝia disvastigo en la portugallingva mondo. Gratulon al la aŭtoroj kaj al la eldonisto!

# PLIGRANDIĜAS NIA ANARO

Ni informas, kun granda plezuro, ke aliĝis al BKE en la lastaj monatoj, Niterói Esperanto-Klubo (Caixa Postal 10, BR 24000 - Niterói - RJ) kaj Religia Asocio Oomoto de Brazilo (Av. Fernando Pessoa, 211 - BR 06600 - Jandira - SP), respektive laŭ kategorioj "A" kaj "B", de nia Statuto.

Kiel individuaj membroj aliĝis: Eberardo Nepomuceno - DF, Idália Freitas Lima - RS, Oscar de Souza Mello - MS, Júlio da Costa Feliz - SP, Ângela Faria - MG, Annita Laguna Gramjgnia - SP, Osvaldo Pires de Holanda - SP, Prof. Wanderlino Arruda - MG, Wâner Marliere Arruda - MG kaj João Andrade - RJ.

Al ĉiuj, kiuj fidas je nia Organizaĵo, akceptu de la Estraro plej koran dankon.



# BRAZILAJ NOVAĴOJ

## FEDERACIA DISTRIKTO

● Laborgrupo "Antaŭen" (Caixa Postal 07-1055 - BR 70000 - Brasília) lanĉis en junio du novajn verkojn el la serio "Brazilaj Kareroj". Ili estas "Questões Gramaticais", de D-ro Porto Carreiro Neto (n-ro 2) kaj "La Brazilaj Aruakoj", verkita de Prof-ro Francisko Valdomiro Lorenz (n-ro 3), kiu temas pri etnografia studaĵo de la Aruakoj, unu el la deksep popolfamilioj el la brazilaj Indianoj. Ambaŭ libretoj estas altvaloraj kontribuaĵoj de la eldoninto por la festoj de la Centjara Jubileo de Esperanto, okazonta en 1987. Ĉu vi jam imagis, ĉu ĉiu E-organizaĵo en nia lando kontribuos same per aliaj eldonaĵoj? Al la motoroj de Laborgrupo "Antaŭen" - samideanoj Nelson Pereira de Souza kaj Adolpho Miranda - nian varman gratulon, pro la sekvenda ekzemplo.

● Ekde la dua semestro nunjara, la gazeto "O Nosso", oficiala organo de Associação Religiosa "Fraternidade Eclética Espiritualista Universal", komencos diskonigi sciigojn pri Esperanto. Laŭ informo de Majoro Silva Velho, la Institucio faros la samon, pere de sia propra Radistacio, kies prefikso ĝi ankoraŭ atendas de la fakaj aŭtoritatoj. Detalojn informos frato Iram (Cap. Severino F. Oliveira, CP 4019 - BR 72.121 - Taguatinga - DF).

● Pro la konstanta inflacio ni informas, kun bedaŭro, ke la jara kotizo por aliĝo de individua membro al nia Asocio kostos Cr$ 3.000,00, komence de julio. La legantoj, kiuj volas aliĝi aŭ realiĝi, bonvole sendu la pagon rekte al Conselho Brasileiro de Esperanto, en Brazilja. Aliĝonto por la unua fojo, samtempe informu: kompletan nomon, sekson, civilan staton, instrunivelon kaj adreson. Ne forgesu: ni bezonas vin!

● Organizaĵo 9-jaraĝa fariĝis BKE la 8-an de junio. Pro la okazintaĵo dekojn da gratulmesaĝoj ricevis nia Prezidanto Carlos Cunha, kelkajn el eksterlando. Al ĉiuj niaj sinceraj amikoj la estraro esprimas sian plej koran dankon.

## BAHIA

● De nia agema Delegito, s-ro José Saraiva Matos, venis informo, laŭ kiu estis fondita en la urbo Feira de Santana, en 30-04-83, alia branĉo de E-studgrupo Zamenhof. La novan studgrupon gvidas S-ino Prof-ino Terezinha Bastos da Silva (Av. Maria Quitéria 2941, BR 44.100 - Feira de Santana), kiu samtempe instruas la lingvon al komencantoj. La inaŭguran lecionon de la kurso ĉeestis S-ino Yvette Menezes Queiroz, Saraiva Matos kaj Inĝ. Isao Noguti, nuna prezidanto de Bahia Esperanto-Asocio.

## MINAS GERAIS

● Ouro Preto baldaŭ gastigos centojn da homoj, kiuj aliĝis al la XVI-a Seminario de Esperanto, tradicia ĉiujara evento realigata de Kultura Kooperativo de Esperantistoj. Koncerne al loĝado, la interesitoj sin turnu al Instituto Esperanto, en Belo Horizonte, per la telefonnumero (031) 201-7819, de la 20:00 ĝis la 21:30, dum labortagoj, kaj de la 15:00 ĝis la 17:30, ĉiusabate.

● En la organiza komitato de la Seminario en Belo Horizonte ĉefrolas s-ano Onésimo Costa e Farias, fondinto de Instituto Esperanto kaj ankaŭ de la Konsilantaro.

## PARÁ

● Ekaperis el la cindroj kaj jam bone funkcias la Klubo Esperantista Zamenhof - KEZ (Caixa Postal 2012, BR 60.000 - Belém), kies novan estraron konsistigas gesamideanoj Alberto Milhomens (Prezidanto), Odilia Milhomons (Vicprezidanto), helpataj de Ramiro Castro, Jorge Elarrat, Wanderley Ichihara kaj Nazareno Salgado. Nia redakcio atendas oportunajn informojn pri la agado de la Klubo, cele al ilia diskonigo pere de nia Bulteno.

## PERNAMBUCO

● Antaŭ du monatoj, Pernambuka Esperanto-Asocio (Caixa Postal 1.139, BR 50000-Recife) elektis novan Estraron, kies Prezidanto estas s-ano Amaro Pinangé Soares. Oficos ankaŭ gesamideanoj Severino Nunes da Costa - Vicprezidanto, Jannes M. Mabesoone - Sekretario, Geraldo Pires Sitônio - Dua Sekretario, Daniel Dorta Murta - Kasisto, Maria José Pontes - Dua Kasisto kaj Carlos Pereira Resende Neto - Bibliotekisto.

● Prof-ro J. M. Mabesoone kaj s-ano Amaro Pinagé Soares, Kiel Prezidanto kaj Sekretario de la Loka Organiza Komitato de la IV-a BKE-Kongreso,sugestas ke oni ŝparu monon ekde nun, por ĝin elspezi en agrabla kulturkun-vivado en Olinda, kie okazos tiu kongreso, en la fino de novembro 1983.

## RIO GRANDE DO SUL

● En Nova Hamburgo komenciĝis alia nova E-kurso elementa, gvidata de la simpatia kaj klera s-ano George O.Vaske (PY3ACE). La lecionoj okazas ĉiudimanĉe, matene, ja Avenuo Bento Gonçalves, 2867.

● Straro Lázaro Zamenhof, en Pelotas, kaj Straro Esperanto, en Lajeado, estas la rezulto de inteligenta persvado de niaj samideanoj Pedro Orestes Sorondo kaj Lênio Marobin, ĉe la urblonsilantoj de tiuj komunomoj. Amase oni skribu al la ĉambro de Konsilantoj de la urboj, kun la celo danki kaj gratuli ilin pro la grava iniciato.

## RIO DE JANEIRO

● Por stimuli la perfektiĝon de siaj membroj en la parola uzado de Esperanto, BEL okazigos regule forumo-debatojn pri diversaj temoj. La unua forumo okazos la 2-an de julio, je la 17-a horo, post la sabata kunveno de la LIGO. Resume: "Instruado de Esperanto per rekta metodo" estas la temo, kiun enkondukos Jorge Cam-

pos de Oliveira; kontraŭparolos Jair Salles; defendos S-ino Maj Bijeleveld kaj la debatojn kaj konkludojn gvidos s-ro Floriano Pessoa. Brave! Jen provo kies sukceson ni antaŭvidas!

● Ni gratulas Prof-ron Sylla Chaves, pro tio, ke li estas reelektita Komitatano "A", por la jartrio 1983/5, komenciĝonta de la 68-a UK en Budapeŝto, kiel brazila reprezentanto de BEL.

● S-ro V. P. Werneck, agema esperantisto en Volta Redonda (RJ) kaj kunaŭtoro de la ĵus aperinta verko "Regras Gramaticais do Esperanto", atingis alian gravan sukceson: aplikadon de Esperanto por disvastigo de Logozofio, kiu celas "konduki la homon al konado de si mem kaj al la realigado de aŭtoperfektiĝo per la procedo de konscia evoluo" (laŭ presaĵo eldonita de Logozofia Fondaĵo, Rua Piauí, 742, CEP 30.000, Belo Horizonte, MG). La adreso de s-ro V. P. Werneck estas: Rua 1, nº 745, Mor. Granja, CEP 27.180, Volta Redonda, RJ.

● La 30 an de aprilo estis elektita la nova estraro de Campos Esperanto-Klubo (Rua Tenente-Coronel Cardoso, 821 BR 28.100-Campos-RJ), nome: Vivaldo Marcelino da Silva - Prezidanto; Jayme Alves Patrício - Sekretario; Luiz Carlos O. Neto - Kasisto; Joel Macil Soares - Instruado; Joaquim de Paula Codaço - Propagando; Kátia de Paula - Socia Direktoro. Kiel kontrolaj konsilantoj elektiĝis: Rossini Viana Nunes, Américo Rodrigues da Fonseca Filho kaj Cláudia Lília Sales de Souza.

● Laŭ la bulteno "BEL-informas", la veterana Esperantista Klubo decidis, kiel kontribuo al la 100-jara jubileo de Esperanto, registri ĉiujn vivantajn esperantistojn, kiuj lernis la Lingvon antaŭ 1948. Se vi estas unu el tiuj niaj samlandanoj, bonvolu tuj kontakti S-inon Cedilha Neto (Av. 13 de Maio 47, sobreloja 208, BR 20.031-Rio).

● D-ro Joaquim de Couto, inda prezidanto de Niterói Esperanto-Klubo, faris interesan prelegon en la sidejo de sia Klubo, okaze de la datreveno de l' forpaso de Zamenhof.

**SÃO PAULO**

● Prof-ro Euclydes Geraldis de Carvalho, plurjara prezidanto de Sociedade Bauruense de Esperanto (Caixa Postal 63, BR 17.100 - Bauru), rekomencis la regulan sendadon de cirkuleroj al la leĝofarantoj de la lando, ĉiam tuŝante E-aferojn, kompreneble. La unua cirkulero de tiu nova periodo instigas la adresitojn interesiĝi pri la komunikado inter la popoloj per neŭtrala lingvo internacia, por solvi unu el la plej gravaj problemoj de la homaro. Tiu dokumento ankaŭ transskribas parton de la mondfama parolado de nia nuntempa provizora Prezidanto de la Respubliko, D-ro Aureliano Chaves, prononcita okaze de la solena malfermo de la 66a UK en Brazilja, en 1981.

● En la urbo São Simão funkcias kun granda entuziasmo la "Liturgia Katolika Esperantista Junularo (Pça. Dom Alberto Gonçalves 36, BR 14.200), kies kunordigantoj estas Rosângela F. Gregório kaj Antonio José. La junaj grupanoj volas interrilatiĝi kun aliaj, por interŝangi sperton pri diversaj aferoj, ĉefe katolikaj. Tre volonte Pe. Pedro M. Urbaitis okazigos en São Simão aŭ en Bento Quirino, en 1984, la unuan kongreson de brazilaj katolikoj. Li atendas sugeston aŭ inviton cele al realigo de tiu pionira evento (Caixa Postal 4421, BR 01000 - São Paulo).

● Invitite de Civitana Asocio de Lernejo SENAI "Luiz Varga" en Limeira (SP), prof. Walter Francini prezentis la 16-an de Majo al ties lernantoj prelegon pri la internacia lingvo. Kun granda afableco akceptis la vizitanton profesoroj Angelo Teixeira Penteado, helpdirektoro, kaj Rubens Menezes, gvidanto de la Civitana Asocio.

● Pro influo de artikoloj aperintaj en la gazeto "A Nova Era", de la urbo Franca-SP, s-ro Elver Ubirajara Teixeira (Rua Lúcio Jaime, 482 - BR 96.560 - Caçapava do Sul - RS) decidis fondi esperanto-kurson en sia urbo, kaj por propagandi la Lingvon li jam havas apogon de la loka gazeto "Folha do Sul" (Informa Servo Silva Velho).



## DONACOJ RICEVITAJ

Por subteni parton de la eldonkosto de tiu ĉi Bulteno, nia financa direktoro en Brazilja registris la enkasigon de jenaj mondonacoj:

| | | |
|---|---|---|
| Gomercindo Dias Nunes . . . . | Cr$ | 3.000,00 |
| Antonio Felix da Silva . . . . . | Cr$ | 1.000,00 |
| Francisco Souza Almada . . . | Cr$ | 500,00 |
| Maria Almada . . . . . . . . . . | Cr$ | 500,00 |
| Ersila Valverde . . . . . . . . . | Cr$ | 200,00 |
| Othon Branco Baena . . . . . . | Cr$ | 1.000,00 |
| Balbina Ferreira . . . . . . . . | Cr$ | 500,00 |
| Ivo Sanguinetti . . . . . . . . . | Cr$ | 1.000,00 |
| Agostinho Rodrigues . . . . . . | Cr$ | 500,00 |
| Francisco Jurandir de Melo . . | Cr$ | 2.000,00 |
| João Andrade . . . . . . . . . . | Cr$ | 8.000,00 |
| Associação Religiosa Oomoto do Brasil . . . . . . . . . . . | Cr$ | 5.000,00 |
| José Cecílio de Carvalho . . . . | Cr$ | 500,00 |
| Ezequias Raimundo Alves . . . | Cr$ | 500,00 |
| Mozar Alves de Andrade . . . . | Cr$ | 1.000,00 |

Ni dankas ĉiujn donacintojn, kaj informas la legantojn, ĉefe tiujn, kiuj ne estas aliĝintaj al BKE, ke iliaj monhelpoj estas bonvenaj. Ĉiun valuton oni sendu al Conselho Brasileiro de Esperanto, laŭ adreso en la unua paĝo de tiu ĉi Bulteno.

# VERDA STELO BRILAS EN JUNDIAÍ

En kuna aranĝo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo (Rua Fáustolo, 124, San-Paŭlo, SP) kaj de Esperantista Grupo en Jundiaí (Rua Barão de Jundiaí, 476) kaj sub la patronado de Sekretariejo de Edukado, Kulturo, Sportoj kaj Turismo de Jundiaí (SP), efektiviĝis je la 21-a kaj 22-a de Majo, ĉe Kultura Jundiaí Asocio, la 9-a San-Paŭla Esperanto-Renkontiĝo, kiun partoprenis pli ol cent personoj. Krom la Esperanto-asocioj, reprezentiĝis ankaŭ Spiritisma Brazila Federacio kaj Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, ambaŭ el Rio-de-Ĵanejro. La Renkontiĝo ricevis grandan helpon de prof. Oswaldo José Fernandes, sekretario pri Edukado en Jundiaí, kiu en sia parolado ĉe la malfermo de la evento deklaris interalie, ke "se la scio reduktiĝas al vortoj, Esperanto estas la scienco pri la scio". La 21-an, tuj post la malfermo, okazis labora kunsido pri la temo "Disvastigado de Esperanto". Prelegis prof. Euclydes Geraldis de Carvalho kaj s-ro Manoel Blaz Garcia. Pli poste, sub la reĝisorado de Amarílio Carvalho, efektiviĝis la Arta Vespero, kiam prezentiĝis unu el la plej bonaj tiaspecaj programoj. Kiel jam tradicie, Ensemblo "Krizolo", el São Miguel Paulista, brile kantis plurajn kanzonojn en Esperanto. La 22-an, dimanĉon, je la 9-a matene, s-ro Ivon Barbosa prezentis kulturan ludon; je la 10-a oni debatis la temon "Instrumetodoj de Esperanto", post prelegoj de s-ino Marija Almada kaj profesoroj Valdemir Moreira kaj Sylla Chaves. Intervenis pluraj aŭskultantoj kaj distingiĝis la junulo Pedro Jacinto Cavalheiro, kiu prezentis la interesan sugeston pliviglígi la instruadon de Esperanto al infanoj. Posttagmeze oni debatis la Jubileon de Esperanto, post prelegoj de prof. Genildo Martins Coelho, Ivon Barbosa, Affonso Soares kaj Carlos Cunha. Ĉe la fino de la debato, speciala komitato taksis la rezultojn de la Renkontiĝo, prezantante favoran raporton. Poste oni servis lunĉon al la partoprenantoj kaj okazis neformala kunveno, kiam oni kantis, deklamis kaj rakontis anekdotojn. Fine on lotumis surbendigilon kaj estis liveritaj premioj al la venkintoj de tradukkonkurso: Marcelo Urbano Ferreira kaj Benedito de Paula. Du interesaj ekspozicioj estis aranĝitaj ĉe la seminariejo, unu pri Esperanto-movado, fare de majoro Gilberto A. da Silva Velho, kaj alia, el pentraĵoj altnivele faritaj de s-no Marija Almada. Bedaŭrinde, la ĉefa organizanto de la evento, profesorino Elvira Fontes, preskaŭ ne povis ĝin partropeni, devigite restadi ĉe hotelo pro malsano. Tamen iras al ŝi la danko de la partoprenantoj kaj la admiro al ŝiaj idealismo kaj laboremo. Tiu ĉi Renkontiĝo portis certe novan stimulon al s-ro Roberto Gomes de Freitas, de Esperantista Grupo en Jundiaí por ke li daŭrigu sian entuziasman agadon por la internacia lingvo. (WF).

# FARENDA REVIZIO

Walter Francini

Pro la Centjaro de Esperanto, okazonta en 1987, UEA disdonas la broŝuron "kiu faru kion", verkitan de A. Brennan kaj R. Corsetti, kun tre interesaj sugestoj por agado fare de UEA mem, internaciaj fakaj asocioj, esperanta gazetaro, landaj asocioj, lokaj grupoj kaj unuopaj esperantistoj. Temas pri oportuna verko, kiun ĉiu esperantisto posedu kaj studu cele al efika agado en la Programo por la Jubileo (1982-1987).

El la sugestoj prezentitaj, ĉiuj bonaj kaj plenumendaj, reliefigas kelkajn, kiuj, laŭ mia vidpunkto, estas pli facile kaj tuj realigeblaj en Brazilo.

Ĉiu landa asocio formu sian propran patronan komitaton, kiu konsistu el membroj de la asocio kaj famaj personoj en la lando. Ĉar en Brazilo ekzistas tri kupolaj organizaĵoj, la nacia patro[illegible] komitato konsistu, krom el famaj personoj, ankaŭ el reprezentantoj de la tri organizaĵoj.

Ĉiu lando havu sian propran planon por la Jubileo. Kompreneble la plano en Brazilo estu kune ellaborita de BEL, KKE kaj BKE. Ŝajnas, ke la plej bona okazo por debati la nacian planon estos la Seminario okazonta en Ouro Preto (MG). Ĝis tiam ĉiu kupola organizaĵo ellaboru siajn sugestojn.

La financa subteno por la efektivigo de la plano estu garantiata per la starigo de Jubilea fondaĵo aŭ io simila. Krome oni organizu aranĝojn por gajni monon por la Jubilea agado (ekz. lotumado, aŭkciado aŭ vendado de donacitaj objektoj, publika prezanto kun enirbiletoj, ekskursoj kun kotizo kaj similaj).

Gravega ero en la Jubilea programo, kaj cetere en la konstanta poresperanta agado, estas la instruado. Pri tio BEL, KKE kaj BKE organizu nacian **seminarion** pri instru-metodoj, esploru la ekzistantajn kurslibrojn uzatajn en Brazilo kaj faru rekomendojn al instruistoj, kaj eventuale komisiu novan lernolibron bazitan sur modernaj principoj de lingvoinstruado.

La landaj asocioj eldonu nacilingvajn varkojn, antologiojn, ktp. pri la historio, atingoj kaj valoroj de Esperanto.

Krome la landaj asocioj adoptu sisteman agadon, por konvinki la superan poŝtan instancon en la lando aperigi poŝtmarkojn okaze de la Jubileo. Lokaj grupoj kontaktu sian lokan poŝtan instancon pri la ebleco aperigi specialan poŝtan stampon dum la Jubilea periodo.

Krom kun multaj aliaj en "Kiu faru kion", mi proponas la jenajn. Unue, starigi ĉiusemajnan au ĉiumonatan Esperanto-rubrikon en loka nacia gazeto, kun novaĵoj pri la movado ĉerpotaj el la revuo Esperanto kaj Bultenoj de BEL, BKE, ktp. Due, eldoni verkojn en Esperanto, cele al la riĉigo de la esperanta kulturo, kaj li-

brojn en la nacia lingvo, por informi la ĝeneralan publikon pri la celoj, la historio kaj la atingoj de la movado. Trie, studi la Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj por konstati la ligon inter Esperantismo kaj tiu gravega dokumento, kaj sekve por pli efike pledi por Esperanto ĉe la oficialaj instancoj kaj altiri la simpation de la ĝenerala publiko al la movado. Tiu ĉi sugesto estas oportuna en Brazilo, tial ke la nacia Konstitucio plene agordiĝas kun la homaj rajtoj. La Jubilea programo taŭgu ankaŭ por kritika revizio pri nia tuta poresperanta agado. Ni memoru ke en la moderna mondo ne sufiĉas, por venki, ke iu afero estas bonega per si mem, kia Esperanto. Urĝas ankaŭ taŭga prezentado pri la interna cia lingvo, efika organizado de la fortoj kaj precipe intensiva, moderna, laŭgrada kaj alloga instruado de la lingvo. Kaj fine, sed ne malpli grave, oni esperas ke la Jubilea programo taŭgos ankaŭ, en Brazilo, por definitive forigi la individuismon kaj la izoliĝon kaj por kunigi la fortojn al la komuna celo. Fakte por esti vera disĉiplo de Zamenhof ne sufiĉas koni ĝisfunde la lingvon kaj labori entuziasme por ĝi, sed necesas, ankaŭ kunlabori tolereme kaj pace kun ĉiuj aliaj grupoj kaj homoj.



## EL LA NACIA GAZETARO

☆ DIÁRIO DE MONTES CLAROS informas pri la loka movado pere de rubriko "Esperanto em Foco".

☆ A PROVINCIA DO PARÁ (C. Postal, 491 - 66000 Belém-PA) publikigis gravan artikolon de s-ano Alberto Milhomens sub la esperanta titolo "Ni semas kaj semas konstante".

☆ DIARIO DO RIO DOCE (C. Postal 100 - 35100 Governador Valadares-MG) kaj JORNAL da CIDADE (en la sama urbo) aperigas anoncojn pri E-kurso gvidata de s-ano Jairo Resende, kiu aktive batalas por la starigo de la tiea Movado.

☆ O IMPARCIAL (São Luís-MA) publikigis interesan artikolon de Prof. Gilson Villas Boas, kiu transloĝiĝis tien el Vitoria-ES kaj daŭre aktivas en la nova urbo.

☆ DE PONTA A PONTA (Belo Horizonte-MG) aperigas noton pri E-kurso gvidata de D-ro Helio Aderne, prezidanto de la Rondo de Kuracistoj Esperantistoj.

☆ O NOSSO (C. Postal 07-119 - 70000 Brasília-DF), oficiala organo de Fraternidade Eclética Espiritualista Universal, per oftaj notoj apogas Esperanton.

☆ FOLHA DO SUL (Rua 7 de Setembro, 767 - 96570 Caçapava do Sul-RS) aperigas trafan artikolon de s-ano Elver U. Teixeira.

☆ ELO - ĉiumonata bulteno de LOJA ADONAI-1377 (Rua do Lavradio, 97 - 20230 Rio de Janeiro-RJ) publikigas E-lecionojn organizitajn de s-ano D-ro Alvaro Fausto de Souza.

☆ CORREIO DO POVO kaj ZERO HORA (Porto Alegre-RS) publikigis interesajn artikolojn pri la de ĉiuj konata pioniro F. V. Lorenz, kiu veninte juna el Eŭropo vivadis en tiu ŝtato, kie li mortis 85 - jara en 1957.

☆ REVISTA INTERNACIONAL DE ESPIRITISMO (C. Postal 9 - 15990 Matão-SP) publikigis agadplanon/83, en kiu s-ro Elfay Luiz Apollo instigas ĉiun spiritisman organizon okazigi i.a. E-kursojn.

☆ O SOL NASCENTES (R. Boiobi, 2102 - 21820 Bangu - R. Janeiro-RJ) anoncas la unuan Estraron de E-Grupo Ismael Gomes Braga (R. Silva Cardoso, 673 - 21810 Bangu - R. Janeiro-RJ), kies Prezidanto estas s-ano Givanildo Ramos Costa, lerninta Esperanton en Brasilia.

☆ CORREIO FRATERNO DO ABC (C. Postal 58 - 09700 São Bernardo do Campo-SP) reklamas pri glumarkoj eldonitaj de Grupo Esperanto kaj Paco (Av. Candido Lucio, 420 - 20000 Belo Horizonte-MG).

☆ REVISTA DA AAFBB (C. Postal 753 - 20000 R. Janeiro-RJ) aperigas artikolon "Esperanto marcha para os 100 anos" verkitan de s-ano Nelson Pereira de Souza.

☆ DIÁRIO DA TARDE (R. Marquês Paranaguá, 9 - 45660 Ilhéus-BA) anoncas la novan Estraron de Grupo Esperantista de Ilhéus, kies prezidanto Eleus L. Sá estis reelektita.

☆ PLANETA (R. William Speers, 1000 - 05065 S. Paulo-SP) ofte publikigas informpetojn de interesatoj pri Esperanto. Ĉar ĝi ja favoras al nia Movado, oni devas ĉiam sendi al ĝi publikigindajn novaĵojn kaj artikolojn.

## ALIA POETO INTER NI

En la nuna rondo de aktivaj E-poetoj, D-ro Jorge das Neves elstariĝas kiel unu el la plej viglaj, pro la sinteza povo kaj senkompara forto de siaj flamantaj versoj.

Tian opinion konfirmas la majstraj versoj aperintaj en la junia numero de la beletra revuo Fonto, kiujn ni transskribas:


**"ANATOMIO**

(Jorge das Neves)

*Haroj*
*lipoj*
*mamoj*
*ventro*
*la mondo tie sube*
*kaj ŝiaj gamboj*
*por alvenigi tian mondon*
*al mi".*

# KRUCVORTENIGMO

**(Speciale por BKE-Bulteno)** **José Saraiva Matos (BA)**




**HORIZONTALE:**

1 - Fotografaĵo; 5 - Malsupra subportanta parto de objekto; 9 - Kvara monato (Sen finaĵo); 10 - Vorto per kiu oni aparte signas kaj distingigas iun aŭ ion (inverse); 11 - Rivero (Portugallingve); 12 - Kalka tegaĵo de iuj moluskoj (Sen finaĵo); 13 - Treege bona; 16 - Konjunkcio; 17 - Speco de seĝo, kiun oni ligas sur la dorso de rajdbesto (S.F.); 18 - Dudeka kaj dek oka literoj de la esperanta alfabeto; 20 - Blanka argilo, el kiu oni fabrikas porcelanon (Sen finaĵo); 24 - Aranĝita laŭ taŭga ordo; 26 - Diferenca, malsama (Sen finaĵo); 27 - Impona graviga aspekto de lukse ornamita viditaĵo (Sen finaĵo); 28 - Spirebla nesimpla gaso, kiu ĉirkaŭas la teron (Inverse); 29 - Grasa fluaĵo, animala aŭ vegetala; 30 - Kiomo de la tempo pasinta depost la naskiĝo (Plurale).

**VERTIKALE:**

1 - Kolorigi (Nur la radiko); 2 - Narkota substanco; 3 - Ceremonia alta seĝo, de reĝo aŭ alia suvereno (Sen finaĵo); 4 - Nedifina pronomo, montranta iun objekton, aferon, ideon (Inverse); 5 - Vazo el vitro, fajenco, ktp; 6 - Forta inklino bondeziri aŭ bonagi al iu; 7 - Strio el ŝtofo, ledo, ktp. por ĉirkaŭigi la talion; 8 - Frato de patro aŭ patrino (Sen finaĵo); 14 - Ago aŭ rezulto eskapi; 15 - Rilata al ambaŭ seksoj; 18 - Grekortodoksa pastro; 19 - Optika instrumento (Inverse kaj sen finaĵo); 21 - Granda laŭ la direkto, perpendikulara al la longeco (Sen finaĵo); 22 - Parto de la maldika intesto; 23 - Poseda adjektivo aŭ pronomo (Plurale); 25 - Esperanta Monda Departamento (Inverse).

Solvo por la Enigmo publikigita en nia Bulteno n-ro 76. **HORIZONTALE:** FEO - KTP - AL - BAR - II - BAMBUAR - KA - ESTRO - BANAN - IO - ALKOHOL - LK - KOR - LA - OOO - KAF. **VERTIKALE:** FAV - EL - ZAMENHOF - TIARO - PIRO - BA - RBS - BANK - UTIL - KALKO - BALO - AOK - OR - LAF - LA.

Centro de Cópias Cerqueira Compôs e Imprimiu